

Hermann Löns,

Ĉevoja cikorio

tradukita de Manfred Retzlaff

De l' vent' polvkovrita
Jen staras herbet',
Kun grizaj folioj,
Sed blua floret'.

Mi staris ĉevoje,
Atendis je vi,
Sed vi la okulojn
Forturnis de mi.

De l' polvo kovrita
Nun estas la blu'
De viaj okuloj,
Kaj brilas ne plu.

Ĉevoje vi staras,
Atendas je mi,
Sed vi jam ne floras,
ho vojcikori'.

*Traduko de la Germana poemo "Wegewarte" de HERMANN LÖNS (*1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-598-1205 (2012-09-17 19:20:47)

Informoj pri la cikorio troveblas en http://eo.wikipedia.org/wiki/Amara_cikorio.